

.....
WIKIPEDIA

10

Vikipedio 10-jaraĝas! Plu kreskas la vikipedio en Esperanto

*Tiuokaze,
SAT-Amikaro sendos
subtenĉekon je 100 € al
Wikimedia France
por subteni
la vikipedian movadon.*




Foto:  Wikipedia, Ziko

Nur tri tagojn post la 10-jara jubileo de la entuta vikipedio-projekto - en la 15-a de januaro - la Esperanto-vikipedio atingis 140.000 artikolojn, nome vespere de la 18-a de januaro. Nuntempe «nia» versio de la vaste konata internacia projekto enhavas pli ol 30 milionojn da vortoj - simile granda kiel multvolumaj paperaj enciklopedioj. Ĝi aktuale okupas laŭ la nombro de artikoloj lokon 26 kompare kun alilingvaj versioj de la reta vikipedio. Antaŭ la tempo de interreto kaj rapida internacia kunlaboro oni simple ne povis revii en Esperantujo pri tia projekto - tiel granda kaj tiel rapida: <http://eo.wikipedia.org>

Pli ol 300.000 rigardoj tage

Ĉiuhore estas proksimume 15.000 rigardoj al paĝo de la Esperanto-vikipedio; per tio Esperanto okupas lokon 38 en komparo kun aliaj lingvoj.

WikiTrans: Automata vikipedio-traduko kun 2,6 milionoj da artikoloj

Multe pli granda ol la Esperanto-vikipedio estas la aŭtomata traduko de la angla vikipedio en Esperanton, kiun preparis la dana entrepreno *GrammarSoft* gvidata de Eckhard Bick. Ĉe <http://epo.wikitrans.net/> eblas serĉi en pli ol 2,6 milionoj da artikoloj maŝine tradukitaj - kun nivelo certe

ne jam perfekta, sed kun kutime bone komprenebla enhavo.

Ĉu vi ŝatus kunlabori en vikipedio?

La artikoloj de WikiTrans taŭgas ankaŭ kiel bazo por kreado de artikoloj en la aktuala vikipedio, se oni volas ĉerpi almenaŭ parton de la enhavo el la angla vikipedio. Se vi volas kunlabori en la granda libera Esperanto-enciklopedio - jen eble bona komenco. Pliaj informoj troviĝas sur la bonveniga paĝo http://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Bonvenon_al_la_Vikipedio.

Lu Wunsch-Rolshoven
EsperantoLand

Legindaj Legendoj Venkas Davido.

«Leginda Legendo» invitas vin legi legendojn el ĉiuj kontinentoj akompanatajn de lingvaj klarigoj.

Kvankam ĉefe destinita al komencantoj, «Leginda Legendo» povas interesi ĉiujn legantojn!

La du armeoj tendumis, ĉiu sur unu flanko de la monto, sin preparante por la batalo. La teruraj Filiŝtoj frontis la malfortajn Izraelidojn, inter ili kuŝis la valo.

Giganta ĉiampiono eliris el la Filiŝta tendejo. Li nomiĝis Goljato. Li portis kirasojn kaj kaskon el kupro kaj pezan kupran ŝildon. La pinto de lia lanco estis plejmoderne el fero. Li forte alparolis la Izraelidojn¹: « Elektu viron por lukti kontraŭ mi. Li venu al mi por dueli. Se li estas sufiĉe fortika kaj venkos min, ni ĉiuj estos viaj sklavoj ». Pro la impresa aspekto de la malamiko, la Izraelidoj timis. Goljato tiel revenis plurfoje por instigi la Izraelidojn al batalo.

En sia distanca bieno, Jiŝajo ordonis al sia plej juna filo, ŝafgardisto, porti nutraĵojn al la pli aĝaj fratoj, en la militistan tendejon.

Davido obee leviĝis² frumatene, lasis sian ŝafaron sur la herbejo al iu gardisto. Li alvenis en la tendaro, informiĝis pri la farto de siaj du fratoj, kiam la militistoj aranĝis sin por la batalo.



Osmar Schindler (1869-1927)
David und Goliath, 1888

Goljato denove revenis kaj defuis la Izraelidojn. Li diris: al tiu, kiu venkobatos tiun gigantan viron, la reĝo donacos grandan riĉecon. Davido aŭdinte la provokon kaj promeson, proponis sin por lukti kontraŭ Goliaton. Neniu kredis, ke li povos venki Goljaton kaj oni trovis lin aroganta. Davido argumentis, ke li ja kapablas timigi la ursojn por protekti siajn ŝafinojn.

La reĝo Saŭlo vestis Davidon per siaj vestoj, donis al li kuprajn kaskojn kaj kirasojn kaj pezan glavon³. Tiel ekipita, Davido provis iri, ne povis ĉar li ne kutimis. Li diris al Saŭlo: «Mi ne estas soldato,

mi ne kapablas marŝi sub tioma pezo.» Li demetis la pezajn armilojn, prenis nur sian bastonon, metis kvin ŝtonojn el la torento en sian sakon kaj kun sia ŝtonĵetilo⁴ en la mano, iris al Goljato. Vidante tiun sveltan kaj maldikan vireton, Goljato malestime⁵ diris: « Venu al mi, mi faros de vi kaĉon por la bestoj. » Tiam, Davido trankvile prenis ŝtonon el la sako kaj per la ŝtonĵetilo, trafis la timigan giganton. La ŝtono frakase penetris en la frunton. La animo vaporiĝis tra la truo kaj Goljato falis kun vizaĝo al la tero.

Teknologio helpas al la malfortuloj.

Klod

Notoj:

1	Izraelido	antikva Israelano
2	Li ne disponis pri lito	
3	Glavo	mallonga peza spado
4	Ilo por ĵeti ŝtonojn foren	
5	Kun malalta opinio pri Davido	

Kvinpetalo, Bureso

Epifaniante la unuan de Januaro, ĉu la staĝantoj volis komprenigi ke pli gravas anticipi la eventojn ol tro fidele respekti la tradicion?



Esperantistoj aktivas

San-Briego (22 Saint-Brieuc)



Ĝoje ni lernis Esperanton

La 11-an kaj 12-an de decembro 2010 Esperanto 22 organizis staĝon en la junulargastejo de San-Briego. Je la 14-a ĉirkaŭ 35 partoprenantoj, ĉefe el Bretonio, estis pretaj por ĝoje studi esperanton.

Estis tri nivelgrupoj: la komencantojn instruis Petra Smideliuz (juna hungarino), la progresantojn instruis Jean-Luc Kristos, pri la babilantoj zorgis Serge Sire.

Ni mem, ĵurnalistoj de la Verda Triskelo, lernis en la duanivelan grupon. Dank' al la pedagogio de nia instruisto Jean-Luc, ni multe parolis esperanton per ludoj, kantoj, krucenigmoj. Plie, ni multe ridis kaj ĝojis, kvankam en nia grupo estis iom tro da partoprenantoj, ĉirkaŭ 20.

Sabatvespere, post la kuna manĝo, ni aŭskultis Jean-Luc ludi elektran pianon kaj kanti. Ankaŭ ni kantis, kaj poste kelkaj dancis bretonajn dancojn dum Stéphane ludis fluton.

Dimanĉe, ni denove lernis ludante, kantante kaj kompreneble ridante.

Dum la staĝo, ni ankaŭ povis konsulti la libroservon, kaj aĉeti librojn (ekzemple «Paĉjo, kio estas rasismo?» el Tahar Ben Jelloun) kaj vortarojn.

Ni vere intencas partopreni la venontan staĝon je la 26a kaj 27a de marto: bonvolu, venu kun ni lerni ludante, ridante.

Alain, François, Marylène, Marie-Pierre kaj nia instruisto Laurent

DUA ESPERANTA SEMAJNFINO

26-a (14h) ĝis la 27-a (17h) de marto 2011

Auberge de jeunesse de St Brieuc (alirebla por handicapitoj)
Manoir de la Ville Guyomard, Les Villages 22000 - Saint Brieuc

Profitu la okazon viziti belan regionon; printempe vere agrablas laŭiri marbordon babilante esperanton.

Intervenantoj:

Marek BLAHUS (Ĉeĥio) 1a nivelo

Renée TRIOLLE 2a nivelo

Christian RIVIERE 3a nivelo

Pliaj informoj:

Esperanto 22 Armor

Franjo LEVEQUE 3, rue Voltaire 22000 - ST BRIEUC

09 53 92 77 37 leveque.franjo@gmail.com

Perkoresponda instruado

La seminario projektita kaj anoncita en La Sago 70 fine okazis en Kvinpetalo⁽¹⁾ (86 Bureso) de la 2010/12/29 ĝis la 2011/01/02 kaj arigis sep partoprenantojn.

En la unua kunsido, ni starigis ĝeneralan skemon de ĉio necesa por iu, se ne ideala, almenaŭ sufiĉe kontentiga servo pri perkoresponda instruado. Sekvis analizo de ĉiuj eroj: ĉu ekzistas (kontentiga aŭ plibonigenda) ĉu ne ekzistas (kreenda aŭ nur kreinda).

Tuj evidentiĝis ke ni ne ĉion povos fari - sed pri tio ni ĉiuj konsciis jam antaŭ la alveno - kaj do ni preterlasis, interalie, ĉion rilatan al perretaj kursoj, kvankam ni bone konscias ke necesas kaj plibonigi tion kio jam ekzistas, kaj krei tion kio mankas, ĉefe pri la niveloj post la unuagrada. Tia servo postulas fakulojn, kiaj ni ne estas, kaj multe pli da tempo ol ni disponis en nia staĝo.

Ni decidis koncentriĝi pri du punktoj, unue la rolo de la kunordiganto, kaj due, la kursmaterialo por la duagrada kurso.

La kunordiganto.

Post la klarigoj de Klod' pri la taskoj kiujn li plenigis ĝis nun, klare aperis ke fakte li surmetis du kaskedojn, nome, tiun de kunordiganto kaj tiun de korektanto, tio iel klarigas ke li demisiis pro troa laboro.

Ni difinis kio estas specife la tasko de la kunordiganto, nome:

- 1) teni liston de la korektantoj
- 2) teni liston de la lernantoj
- 3) rilatigi ilin
- 4) sekvi la evoluon de la kursoj, ĉefe ricevi bilancon
- 5) rilati kun la libroservo kaj la kasisto

Ĉe la punkto 3 riveliĝis grava misfunkciado, ĉar la rilatigo okazas iom hazarde, pro manko da kono kaj de la korektantoj kaj de la lernantoj.

Ni do decidis redakti du demandarojn, la unuan por la korektantoj, la alian por la lernantoj, por pli bone scii kiunivele ili deziras labori, kun kia metodo, laŭ kiu ritmo, ktp, tiel ke oni pli kongrue rilatigu lernantojn kun korektantoj. Ni ankaŭ decidis ke la kunordiganto, prefere ne estu samtempe korektanto, tiel evitante ke ĝi sin tro ŝarĝas kiam ĝi ne scias al kiu transdoni novan lernanton, kaj ankaŭ por ke la tasko estu sufiĉe ne peza, tiel ke ĝi povas instigi iun transpreni ĝin. Provizore, mi transprenas la taskon, almenaŭ dum la periodo necesa por enkonduki la sistemon per demandaroj priskribitaj ĉi supre, sed ja necesos trovi alian kunordiganton: La Sago estas per si mem sufiĉe tempovora! Do, jam se iu

sentas emon por tiu ne tre peza tasko, tiu sin anoncu!

Duagrada kursmaterialo.

La libro «*Por la praktikantoj*» de Pierre Babin estas taksata de Klod' bona ilo por tiu nivelo, kaj ankaŭ ŝatata de lernantoj kaj korektantoj. Tamen nun ĝi prezentas du malavantaĝojn, unue ĝi iĝas iom eksmoda, due - kaj ĉefe! - ĝi ne reeldoniĝas...

Ni decidis revivigi ĝin - kun la plena konsento kaj kontento de P. Babin - sub formo de memstaraj slipoj (4 A4-paĝaj), redaktitaj laŭ fiksa ŝablono, kiun ni difinis.

La ŝablono sekvas pli-malpli tiun de la jam ekzistanta Babinaĵo, la ĉefaj diferencoj estas:

* malaperigo de la desegna paĝo (kiu celis paroligi la lernantojn, do ne kongruas por perkoresponda kurso).

* anstataŭigo de la unua teksto per bildo kun teksto (humuraĵo, bildrakonto, k.s.) por diversigi la formojn; la klarigoj kaj demandoj rilatos kaj al tiu bildo kaj al la eltiraĵo de literatura verko.

* aldono de unu tasko, laŭplaĉe, redaktado aŭ traduko.

La principo resumiĝas tiel: la kurso konsistas el fiksa nombro (ekz. 15) da slipoj, elektitaj laŭ difinita progres-programo, sed ankaŭ laŭ la temoj, aŭ laŭ specifaj bezonoj, depende de la petoj de la lernanto. Tio supozas grandan stokon da slipoj (celo por la jaro 2011: 40 slipoj: 20 adaptitaj de la libro + 20 novaj).

Tiu laboro nepre estu skipa laboro; se multaj homoj partoprenas en ĝi, ne estos individue multo por fari, kaj estas diversaj manieroj kunlabori:

* ĉu engaĝiĝi por redakti eĉ nur unu slipon,

* ĉu nur kolekti tekstojn aŭ bildojn,

* ĉu nur el tekstoj/desegnoj redakti la necesajn klarigojn aŭ la demandaron,

* ĉu nur proponi temojn por redaktado aŭ tekstojn por tradukado.

La skipo jam konsistas el la partoprenantoj de la seminario, kaj ĉiuj volontuloj estas bonvenaj, eĉ por tute eta kontribuo.

Por ĉiaj reagoj, skribu al La Sago, ĉu rete (lasago@free.fr) ĉu poŝte (La Sago ĉe Serge Sire 85 imp. des Fées 74330 Sillingy)

Serĝo

(1) Eksterteme, la staĝo spertis tre malvarman buresan kuntekston. Ja pri la vetero, oni malfacile povas kulpigi iun...

Enhavo

- 1 [Kovrilpaĝo](#) Vikipedio dek-jaraĝas!
- 2 [Legendaj legendoj](#)
[Esperantistoj aktivas](#)
- 3 Perkoresponda instruado.
- 4 [HuMorelaj Linioj](#)
Selle-Humuraĵo
- 4-5 [Atesto pri la eventoj sur Placo Bellecour...](#)
- 5 [El nia leterkesto](#)
Selle-Humuraĵo
- 6 [E-kuiru!](#)
Pli etikaj bankoj
Selle-Humuraĵo

Supplément en français

- 7 [Il s'en est fallu de peu](#)
- 8 [L'espéranto au Bac](#)
- 9 [Espéranto Ariège.](#)
- 10 [L'espéranto, comment ça marche ?](#)
- 11 [Praktikaj informoj](#)
- 11.12 [Kiel esperantigi proprajn nomojn](#)
- 12 [Libro-servo](#)
- 13 [Libroj vivas pli longe](#)
- 14 [Alvoko al kandidatiĝoj](#)
Kotizo, fisk-atestoj kaj abonoj
Dua projekto de Interkant'
- 14.15 [Seta kongreso](#)
- 16 [Esperantistoj aktivas](#)
Ĉe la lago 72

Reagu!

Pri la franclingva suplemento

* Ĉu vere utila ?

* Kiel vi uzas ĝin ?

Ĝi aperas kolore, jam de la pasinta numero.

* Kion vi opinias pri tio ?

Malfruo...

Vi ja ricevis LaSagon71 kun iom da malfruo... Fakte, nia presisto donis al si vintran ferion (skandale, ĉu ne ?), kaj ne avertis nin (ja pli skandale, ĉu ne ?)...

Ankaŭmankislareferendumilopri Greziljono... Ni ree klopodis, ke ĝi estu kun tiu ĉi !

Estu vi indulgemaj !

Partoprenis en ĉi numero:

(laŭ alfabeto ordo)

Klod	Franjo	Leveque
Ĝenovevo (Beziero)	Ljo	Markovo
Alain (Esp. 22)	Lino	Martin
François (Esp. 22)	Guy	Morel
Marylene (Esp. 22)	Lin'	Nicolas
Marie-Pierre (Esp. 22)	Yves	Scibor
Laurent (Esp. 22)	Frédéric	Selle
Andreo Andrio	Jean	Selle
Jorgos Comte	Serĝo	Sir'
Izabelo J.	Lu	Wunsch-
JoLo Ko		Rolhoven
Ĵak Le Puil		

HuMorelaj Linioj...

Karaj geamikoj de La Sago,

Ĉiutage, multaj eminentaj personoj kandidatas kiel Prezidento de la Respubliko.

Karaj geamikoj, vi elektis min kiel Esperanta kandidatino: dankon al ĉiuj.

Nun, tuj, ni devas pripensi, prepari nian agadon por nia sukceso. Kune, ni venkos ĉar ni estas la plej bonegaj! Mi promesas al vi premiojn: bombonojn, diplomojn, medalojn. Jen mia skipo laŭ viaj kompetencecoj.

■ Serĝ' desegnos la afiŝojn (prefere mi estu dorse).

■ Klod' skribos mian biografion. Mi ankoraŭ hezitas; ĉu mi naskiĝis en ruldomo en cigana familio? Ĉu mi estas la kaŝita filino de la sinjorino L.B. kaj de la fotisto J.M.B. ? Donu vian opinion, poste mi decidus...

■ Jean S. kaj Ĵak L.P. redaktos la programon laŭ la prediko de la parokestro de **Cucugnan**, la teorioj de la Profesoro **Nimbus**, eble de la antaŭdiroj de **Nostradamus**.

■ Andreo A. redaktos, uzante multnombrajn nekonatajn vortojn, miajn paroladojn.

■ Guy M. okupiĝos pri la financoj: vendado de la kukoj faritaj de Flora, kantado de Lin' surstrate, devigataj kontribuajtoj de ĉiuj grupoj kaj geesperantistoj.

■ Vito prizorgos min kiel korpogardisto (gorilo) kaj kinezoterapiisto (flegisto).

■ Vinko, per sia mikroskopo, kontrolos vian agadon.

■ La aliaj gehelpantoj de la gazeto aplaudos min dum la balotkampanjo.

Mi longtempe cerbumis por trovi mian sekretan devizon «ĉio por mi, nenio por vi».

Dum nia renkontiĝo en Seto, ni parolos pri la estonteco...Ne!.. Parolos mi, jesos vi!

Kuraĝon geamikoj, ek al la laboro!!!

Lin' Morel'

Atesto pri la eventoj sur Placo Bellecour,

lom post tagmeze, mi atingas Placon Bellecour kun pluraj studentaj geamikoj. Manifestacio de studentoj kaj liceanoj, kunlabore kun la sindikatoj CGT kaj SUD, estas programita je la 14a sur Placo A. Poncet, kiu angule tuŝas Placon Bellecour. Multaj junuloj ĉeestas, plej parte liceanoj kaj gimnazianoj. Por eniri la placon, oni trairas vicon da policistoj. Ili plurdeke deĵoras ĉe ĉiuj elirejoj de la publika placo, unu el plej grandaj en Francio. Ili surhavas kirason de la kapo ĝis la piedoj, kaskon, ŝildon, klapon, pafilon... Ankaŭ deĵoras kamiono de GIPN (intervenata grupo de la nacia polico, tiuj havas blenditan kamionon kaj surmetas vizaĝkaŝilon) kaj du kontraŭribelaj akvokamionoj. Helikoptero malalte rondflugas super la loko. Tridek minutojn poste, pro kelkaj lanĉitaj ŝtonoj al la policistoj kaj al iliaj veturiloj, la policistoj ekmoviĝas kaj pafas plorigajn raketojn. La amaso dispartiĝas.

Proksimume je 13h30, ni ekiras al la poŝtoŝtacio, de kie foriras la manifestacio. La polica vico deĵoras plu kaj apartigas la manifestaciantojn kiuj jam estas sur Placo Bellecour de tiuj de la placo A. Poncet. Ili rifuzas, ke ni tien iru. Post tridek minuta traktado, probable kun la helpo de la sindikatoj, ili tamen malfermas la vicon kaj ebligas trapason de trideko da personoj, sed subite refermas ĝin, kiam, videble, la homoj, kiuj eliras, ne plu aspektas kiel «bonaj manifestaciantoj» (hela haŭto, ne tre junaj, sen sportvestaĵoj kaj kapuĉoj). Neniu tiam rajtas eliri el Placo Bellecour. Streĉiĝo. Al kelkaj ĵetaĵoj la policistoj respondas per klaboroj levitaj kaj plorigaj raketoj. Dum unu horo ni vane provas aliri la alian parton de la manifestaciantoj, kiuj nin atendas je la alia flanko. Ankaŭ ili ricevas gasojn. La amaso sur Bellecour estas dispartigita.

Finfine, je 15h30, la «liberaj» manifestaciantoj decidas ekdefli. Dume ni atendas. Nia amaso konsistas el pluraj centoj da homoj sur la placo, kiu fariĝis relative trankvila. Oni atendas po etaj grupoj, dismetitaj sur la tuta placo. La policistoj diras, ke oni povas eliri, kiam la manifestacio estos foririnta. Oni atendas. La helikoptero bruege rondflugas super ni. Okazas kelkaj amasiĝoj, sed la sceno kvietas. Verdire, oni enuas. Antaŭvidinte ordinaran manifestacion, mi kunportis nenion, nek akvon, nek nutraĵon, nek ion por min okupi. Mi atendas, kiel la aliaj. Iom poste, kun amikino, mi decidus foriri. Sed la policistoj denove rifuzas. Eble estas 16h30, jam de tri

horoj ili detenas nin. Mi diras al ili mian bezonon pisi kaj manĝi, sed senrezulte. Mi trotediĝas kaj ekkonscias pri la trudita reteno, kiun mi suferas. La policistoj diras, ke ili obeas ordonon de la prefekto, ankaŭ ke ili ne scias, kiam oni permesos liberigi nin. Al amiko, kiu demandas, ĉu eblus ricevi de ekstere pilkon por sin iom distri, la policisto respondas, ke li prenu la plenplenan vezikon de la junulino kiu ĵus petis eliri por viziti necesejon, kaj ridegas kun siaj kolegoj.

Neniu komprenas la situacion. Tamen la placo iom malpleniĝis. Helpitaj de loĝantoj kaj komercistoj, kiuj malfermis al ili siajn pordojn kaj siajn malantaŭajn ĉambrojn, iuj personoj sukcesis eliri. Oni ankaŭ informas min, ke la policistoj ebligis la eliron de kelkaj el miaj studentaj amikoj, sed la junuloj tipe magrebaj apud ili estis forpelitaj de la elirejo. La facia delikto unuarangas. Sur la placo, ni ne nin organizas. Ĉiu estas izolita, kaprompita, nur atendas la momenton de elirpermeso. La aĝa mezo ne superas 18 jarojn.

Proksimume je la 17a, oni informas nin, ke ni ne povas eliri antaŭ la 21a. Ekpaniko. Mi aŭdas kolegojn kiuj telefone provas komprenigi al siaj gepatroj, ke ili ne povas hejmenreveni pro malpermeso de policistoj. Pli kaj pli malvarmiĝas. Mi reiras al la policistoj por ricevi klarigojn. Unu el ili klarigas, ke «oni bonŝancas esti en Francio ĉar, se oni estas en Hispanio, la Civila Gardo estus jam rompinta nian kapon», ankaŭ ke «kiam okazas publikaj tumultoj, la libereco ien ajn iri povas esti flankenmetita». La placo tiam, kaj jam de unu horo, estas tute kvietita. Kiam, iom poste, iuj junuloj proteste ariĝas meze de la placo, tiuj policistoj, kun kiuj ni «babilis» tuj prezentas al ni siajn armilojn (mi ne scias, ĉu temas pri raketpafiloj aŭ flash-ball) kaj ordonas al ni retropaŝi. Tion ni faras. Plorigaĵoj estas disĵetataj sur la tuta placo: raketoj ĉielen lanĉataj brulante refalas ĉiudirekten. La homoj hazarde kuras. Oni provas resti sur la trotuaro, proksime al la domegoj por kiel eble plej sin ŝirmi. Iu junulo kuŝas. Iuj revenas por helpi lin, dum policistoj, je 10 metroj, minacas ilin per siaj pafiloj. Mi aŭdas, ke li estas vundita, kaj junuloj, levinte la brakojn, petas la policistojn ne sturmi. Finfine la policistoj pelas ĉiujn homojn. Ili provas starigi la junulon, kiu iom sin defendas. Ili triope teren blokas lin kaj poste trenas lin, tirante lin je lia brako ĝis la policista kamiono, kie li malaperas. Antaŭ mi junulino,

Selle humuraĵo Laŭ ministra ordono

Via kontrola misio estas simpla:
estas la francaj fremduloj, la nefrancaj
fremduloj kaj la fremdaj fremduloj

Se vi tion
asertas!



en Liono, la 21an de oktobro 2010.

proksimume 15 jaraĝa, ploras en la brakoj de sia amikino. Ambaŭ iras al la policistoj, petas eliri, ploras, asertas ne plu elteni, volas hejmen reveni. La policisto forpelaĉas ilin. Eksplozibruoj daŭre aŭdeblas, fumo kovras la tutan placon. Oni malfacile malfermas la okulojn kaj enspiras. Je 30 metroj de mi, junulino tere kuŝas. Homoj ariĝas por ŝin helpi. Videble ŝi ne reagis, mi ne scias, kio doloras ŝin. Ĉu estas astma krizo ĉu flash-ball-trafo? (tamen mi kredas, ke neniu flash-ball-pafo okazis). Homoj kriis, ke oni alvoku la fajrobrigadistojn. Finfine, post 10 minutoj la policistoj forpelis ĉiujn homojn kaj retiriĝis kun ŝi.

La helikoptero rondflugas plu super niaj kapoj.

Por respondialnia nekompreno, iu policisto diras: «Temas pri polica ennoviĝaĵo».

Mi marŝas. Ariĝo ekokazas meze de la placo. Ĉiuj ne plu eltenas. Oni nun timas, ke eliro ne plu eblos. Protestkrioj. Ŝtonoj poiomete estas ĵetataj. Ili denove respondas per plorigaĵoj kaj per eksplodoj sone fortegaj. Nun ili decidas uzi siajn kontraŭtumultajn akvokamionojn. Ili akvumas. La homoj dispartiĝas. Oni atendas. Ili unu du fojojn denove ŝprucigas akvon. Oni vagas unuope. Ĉiuj marŝas. Mi ne plu eltenas. Mi ekpanikiĝas. La placo fariĝas sensuna. Malvarmas. De la mateno mi nenion manĝis. Oni denove pli-malpli grupe marŝas.

Proksimume je la 18a, la policistoj informas nin, ke oni povas eliri ĉe la norda angulo. Ĉiuj tien iras. Ili respondas al ni per plorigaĵoj. Oni revenas. Homoj krias, brakojn levitajn: «oni diris al ni ke eblas eliri tien!». Denove plorigraketoj kaj dispartiĝo. La trian provon, oni permesas al ni alproksimiĝi. Efektive, la policistoj fine lasas nin eliri. Ili elirigas nin unu post alia, notas la nomojn, antaŭnomojn, la adresojn, korpe esploras nin kaj malplenigas la sakojn. Pro tio ke ni estas pli ol 200 homoj, tio daŭras longe. Oni obeeme viciĝas, kun la kapo mallevita. Vicigitaj, la kaptitoj estas almetitaj ĉe la ekstremaĵo de la placo. Ili diras, ke ni ĉiuj eliros, sed unu post la alia. Oni atendas. Tiuj kiuj ne havas sian identigilon estas flankenmetitaj. Finfine oni eliras. Dum ili korpe «esploras», ili diras, ke ili tion faros rapide. Mi estas naŭze elĉerpita. Jam de preskaŭ 6 horoj la policistoj ricevis ordonon malebligi eliron de placo Bellecour. Dum 6 horoj, proksimume 200 homoj (kaj mia kalkulo estas minimuma) estas senigitaj je siaj bazaj liberoj: ien ajn iri, manĝi, trinki, viziti necesejon. Dum 6 horoj oni detenas nin sur publika placo, psike ŝokitaj, sen komprenkapablo, ĉirkaŭitaj de centoj da policistoj, kiuj minacas nin per siaj armiloj ĉe iu ajn preteksto, kaj kiuj uzas ilin... kaj helikoptero, kiu turnas sin kvazaŭ senĉese. La policisto kiu kontrolas la identigilon de

mia amikino diras «tiel, ĉu ne, vi ne plu emos rekomenci!».

Aĉe...

Miaj nervoj ne plu eltenas, iu policisto rimarkas, ke mi ploras kaj klopodas rapide irigi nin malantaŭ la policistan vicon, kiu apartigas nin de ekstere. Li irigas nin meze de grupo el tridek junuloj, ĉiuj tipe magrebaj au afrikaj, kiuj eniras aŭtobuson. Neniu aĝas pli ol 18 jarojn. Mi demandas, kien ili iras: ĝis la policejo por kontroli ilian identecon. Estas 18h 45. La policistoj diras, ke ili estos liberigataj dum la vespero. Du tiaj aŭtobusoj foriros al la policejo.

La vicon trapasinta mi aliras la liberajn manifestaciantojn kiuj, post la manifestacio revenis kiel eble plej proksime de Place Bellecour por subteni nin. Oni proponas al ni manĝaĵon, oni provas nin malstreĉi. La manifestaciantoj provas malebligi la foriron de la aŭtobusoj, sed intervenas BAC-brigado, kaj la busoj foriras.

Tre malbone mi travivis tiun situacion, ja. Ŝokita, ja. Plie, mi iras la unue viditan kafejon por viziti la necesejon. La komercisto rifuzas, dirante, ke li jam rifuzis al 10 personoj, ke li ne intencas malsame konduti por mi. Mi pisas surstrate, sub la rigardo de la pasantoj, de la manifestaciantoj.

Humiligita, ja.

Oni elprenis mian rajton manifestacii, oni elprenis mian rajton libere iradi. Ni estis arigitaj kiel brutaro, kelkfoje pelitaj de iu flanko de la placo al iu alia de armitaj moviĝemaj grupoj. Mi nenion insultis, mi frapis nenion. 6 horoj da kolektiva retenado subĉiela kun polica timigado. Dum 6 horoj, neniu montrofenestro estis frakasita, neniu publika bieno estis difektita. Mi povas aserti, ke, tamen, post pluraj horoj, kvankam pacema, mi eksentis fortan koleron. Bezonon protesti. Jes. Ĉar jen la bezono diri Ne al tiaj «policaĵ ennoviĝaĵoj». Tiu retenado estis ne normala, senmotiva. Ni estis senĉese streĉitaj, kaj oni uzis armilojn tro potencajn kontraŭ la amaso retenata. Kiel multaj homoj, tiun posttagmezon mi nur estis aliranta manifestacion, deklaritan, permesitan de la prefektejo.

Hodiaŭ vespere, mi ne sukcesas endormiĝi.

Lou Andrua, studentino en Supera Lernejo por instruistoj kaj esplorantoj, magistra nivelo pri sociologio.

Tradukis Yves Nicolas
el teksto aperinta ĉe <http://antennereais.canalblog.com/archives/2010/10/24/19418447.html>

El nia leterkesto

Pri la reklamo Sojasun en decembra n-ro de La Sago (70)

Mi same kiel Serĝo opinias, ke por konsumiga socio ni ne devus perdi koloran inkon en la paĝo de La Sago. «natura»?!... ĝi eĉ ne estas eko-produktaĵo (sen pesticidoj).

Sed nun mi skribas ne ĉefe por subteni Serĝo-n, sed ĉar en tiu artikolo kaj sur la varo troviĝas alia eraro, nome ne nur pri la vorto «jogurto», sed ankaŭ la vorto «sojo»! => vera signifo de sojo en Esp. estas «sojfabo saŭco»= saŭco el fermentitaj sojfaboj kaj plejofte kun tritiko, kiu estas uzata tre tre populare en ekstremorienta Azio kaj hodiaŭ pli kaj pli eĉ en Eŭropo.

Kaj la vorto «sojo» devenas de la ĉina-japana vorto («ŝoju» en la japana) kaj la okcidentanoj «fazeolon/fabon de sojo» missimpligis al ekz. Soja en la franca.

Tamen ni (E-istoj) konservas la originan ĝustan signifon de sojo en Esperanto ne kiel interokcidentana lingvo, sed kiel tutmonda lingvo, dank' al postulemo de E-istoj el ekstrema orienta Azio. Vidu ankaŭ PIV-n.

Ljo (mondocivitano*:

iama loĝanto en ekstremorienta azio)

* mi ne estas t.n. Mondocivitano

Selle humuraĵo **Intenca malkompreniĝo en Niĝerlando**

Sinjoro la agronomo, la grundo fariĝis malriĉa!

Mi ne estas agronomo, sed geologo. Fosojn truojn kaj truojn! La subgrundo estas riĉa je uranio!



E-kuiru!

Fazeoloj kvinpetalecaj

Laŭ recepto finpretigita en Kvinpetalo
Por 4 personoj

2 supkuleroj da graso de ansero
2 cepoj
2 ajloj
1,5 kg da fazeolsemoj
1 kg da freŝa tomata saŭco

Antaŭ ĉio, ne forgesu partoprenigi viajn invitotojn en la elŝeligado de la fazeoloj!

La vesperon antaŭ la frandado, metu la freŝajn fazeolojn en akvon kun kulereto da bikarbonato.

Matene, ŝanĝu la akvon kaj kuiru la fazeolojn ĝis la akvo bolas. Malŝaltu la fajron kaj ĵetu la akvon.

Dum tiu kuirado, preparu la freŝan tomatan saŭcon.

En poton, metu la grason de ansero kaj poste cepojn kaj ajlojn kaj brunigu ilin.

Aldonu la fazeolojn kaj la tomatan saŭcon kaj akvon se necesas.

Malrapide kuiru ĝis kiam la fazeoloj estos manĝeblaj.

La kuirado povas esti longa (2 horoj). De tempo al tempo, kontrolu, movu la fazeolojn kaj aldonu akvon se necesas. Kiam la fazeoloj estas bone kuiritaj, ĉesu la kuiradon.

Bonan laboron, bonan apetiton!

Ĝenovevo, Lin'.

Selle humuraĵo Labor-akcidento

Kio okazis?

La ĉefkuiristo estas infektita de oraj stafilokokoj...



Pli etikaj bankoj

Dum la membrokunveno de SAT-Amikaro en aprilo 2010, ni decidis esplori eblecojn pri pli etikaj bankoj, por iam deponi nian asocian monon.

Iu kongresano emfazis ke etikaj bankoj estas oksimoro. Pro tio, ni preferas skribi pri «pli etikaj bankoj».

En SAT- medio, okazis 2 interesaj debatoj en la kongresoj en Milano (2009) kaj Braŝovo (2010); dosiero estis publikigita en Sennaciulo en januaro-februaro 2010. Notinde, ni interŝanĝis pri alternativaj bankoj, kiuj ekzistas en diversaj landoj (Britio, Aŭstralio, Italio, Germanio, Francio, Hispanio). Ni komprenis ke pli gravas ol la statutoj de la bankoj, la celoj kaj trarivedleco por kontroli ilian agadon.

Plie, ni serĉis per la reto, dokumentojn en kiuj oni taksas bankojn laŭ etikaj kriterioj.

Ĉiam, ni devas memori ke mono origine ne havas valoron; estas nur rimedo, kiu ebligas pli efikan interŝanĝon ol simplan varinterŝanĝon. La bankoj estis kreitaj por ricevi tiun monon kaj pruntedoni ĝin. Bedaŭrinde, iom post iom, ili celis gajni pli kaj pli da interezoj per tiu laboro kaj ignoris ke homoj bezonas nur interŝanĝi varojn per tiu mona rimedo. Eĉ, multaj bankoj nuntempe, ne ĉefe zorgas pri siaj unuaj celoj, sed vetas pri valoro de monunuoj, varoj kaj iaj.

Ĉar ni estas membroj de asocio, kiu celas klerigon de siaj anoj, ni opinias ke ni devas deponi nian monon en bankoj, kiuj uzas ĝin en agadoj sufiĉe proksimaj de niaj propraj celoj kaj ideoj. Interalie, ĉu la banko, kiun ni uzas, pruntedonas por fabriki armilojn, por disvolvi firmojn, kiuj ekspluatadas laboristojn aŭ infanojn...

Tiacele, ni serĉis bankojn, kiuj pli ol malpli proponas trarivedlecon kaj decidis uzi ricevitajn monon laŭ niaj etikaj kriterioj: trarivedleco, administrado de la banko, projektoj kaj temoj subtenitaj per pruntedonoj, sekureco pri deponoj de kliento-mono...

En Eŭropo, ekzistas federacio el 25 etikaj kaj alternativaj bankoj. Nur du francaj bankoj aliĝas al tiu federacio: financa kooperativa firma *La NEF* kaj banko *Crédit coopératif*.

Krom tiu federacio, ni trovis iun svedan bankon, kiu proponas nur al siaj svedaj membroj, pruntedonojn kaj ŝparojn sen interezo.

En Francio, multaj bankoj proponas bankajn produktajn etikajn; sed fakte estas nur ŝildoj antaŭ aliaj maletikaj agadoj. Tiuj bankoj multe komunikas sed malmulte agadas en tiu kampo.

En 2007 kaj 2009, la asocio «*les amis de la terre*» taksis plurajn bankojn laŭ sociaj kaj ekologiaj vidpunktoj. Ili konkludis ke nur du bankoj, unue *La NEF* kaj due *Crédit coopératif* pozitive agadas pri tiuj temoj en Fancio. Ni povas citi eltirajojn el tiu dosiero:

La Nef: la plej bona elekto

Kvalitoj: kompleta trarivedleco pri pruntedonoj; ĉiuj koncernas ekologiajn, sociajn aŭ kulturajn projektojn.

Crédit Coopératif: por socia ekonomio

Kvalitoj: rifuzas helpi riskajn internaciajn projektojn kaj proponas interesajn pruntedonojn por ekologiaj agadoj.

Malkvalitoj: maltrarivedleco sed pliboniĝas.

Ni povas aldoni ke bedaŭrinde, tiu banko ĵus

aliĝis en bankaro kun *Banque Populaire*.

Banque Populaire: unua banko, kiu agadis favore al ekologia loĝado.

Kvalitoj: progresas pri trarivedleco; unua banko pri ekologiaj pruntedonoj al unuopuloj.

Malkvalitoj: malfruiga por redukti mediajn riskojn; aĉe agadas per sia subfirmo *Natixis*.

La Banque Postale: ne taksata ĉar ĵus kreita.

Ni uzas tiun bankon, eks-ŝtata (franca poŝto) kaj scias ke mono estas interalie pruntedonita al la franca ŝtato, kiu konservas gravan rolon en armilaro kaj nuklea energio.

Ni pliesploris la kooperativon *La Nef*. Estas kooperativo kreita en 1998, en kiu la societanoj decidis politikan agadon. Ĉiujare, regionaj kunvenoj ebligas prepari la membrokunvenon. Detalaj dokumentoj estas publikigitaj pri respekto de ĉarto kun etikaj kriterioj, interalie listo de ĉiuj pruntedonoj.

Tiu kooperativo ne ricevis bankan statuson kaj ne rajtas ricevi tuj disponeblan monon. Nur deponojn dum pli ol 25 monatoj, ĝi povas ricevi. Pro tio, ĝi kunlaboras kun la banko *Crédit coopératif* por proponi bankajn produktaĵojn: ĉekaron, bankkarton, disponeblan deponon. Entute, *La Nef* deklaras ke 65% de la deponita mono estas reuzita en pruntedonoj laŭ etikaj kriterioj. Pri la restaĵo, restas demando ĉar *Crédit Coopératif* ne proponas similan trarivedlecon, eĉ se ĝi ĉefe agadas laŭ similaj celoj.

De du jaroj, *La Nef* strebas por krei la unuan eŭropan bankan kooperativon kun aliaj bankaj kooperativoj: *Banca popolare Etica* el Italio, *FIARE* el Hispanio, *Credal* el Belgio, *Oekogeno* el Germanio kaj *Hefboom* el Belgio.

Konklude, la komitato proponas al la legantoj de *La Sago*, debati per la revuo pri tiu temo kaj la ĉi-subaj proponoj, kiujn ni intencas prezenti al la kongresanoj en Seto:

■ provizore konservi *La Banque postale* por niaj ĉekaroj (libroservo kaj kutimaj spezoj) sed iĝi societano kaj deponi nian rezervan monon en *La Nef*.

■ decidi kiel nia mono estos uzita (eko-agrikulturo, socia kaj solidara ekonomio, instruado kaj kulturo aŭ ekologio).

■ decidi ĉu ni donacos parton de niaj interezoj al asocioj, kiuj kunlaboras kun *La Nef*.

PS: En 2010, la interezoj en *La Nef* variis inter 1% kaj 3,50% laŭ daŭro de la depono.

Dok.: Sennaciulo januaro-februaro 2010 dosiero: etiko en komerco kaj bankaj medioj.

Artikoloj pri dosiero de «*Amis de la terre*» pri bankoj laŭ ekologiaj kaj sociaj vidpunktoj.

<http://www.econologie.com/forums/changer-de-banque-criteres-ecologiques-et-sociaux-vt6268.html>

retejo: www.banktrack.org/...banque/_0_1_0_0_comment_choisir_ma_banque.pdf


La Komitato de SAT-Amikaro

NDLR. Kvankam subskribita de la Komitato de SAT-Amikaro, tiu artikolo prezentas argumentojn, kiuj ne nepre spegulas iun «oficialan ideologion» de nia asocio, interalie pri ekologio, armiloj kaj atomenergio. Oni do bone konsideru tiun tekston nur kiel bazon por debato.

Supplément Fr.
Février 2011

Il s'en est fallu de peu...

Oui il s'en est fallu vraiment de peu que l'espéranto soit adopté comme langue internationale par la Société des Nations (SDN), ancêtre de l'ONU.



Un volumineux rapport extrêmement positif du secrétariat de la SDN publié sous le titre "L'espéranto comme langue auxiliaire internationale" (28 juin 1922) dans un contexte historique favorable aux idées de paix et de rapprochement entre les peuples augurait bien de l'adoption d'une telle résolution. Mais

on sait que le délégué français Gabriel Hanotaux, seul contre tous, s'opposa farouchement à ce que la question soit traitée. Il voyait dans l'espéranto une menace pour le français qui risquait ainsi de perdre son statut de langue de la diplomatie.

"L'espéranto comme langue auxiliaire internationale"

Résumé du rapport du Secrétariat général adopté par la troisième Assemblée de la Société des Nations

Dès sa création, en 1920, la SDN a reçu un grand nombre de demandes en faveur de l'adoption d'une langue auxiliaire et surtout de l'espéranto.

Au cours de la première assemblée, on s'est dit d'accord avec la nécessité d'une langue internationale et avec tous les arguments favorables à l'espéranto, mais on a renvoyé toute décision à la deuxième assemblée, en demandant un rapport détaillé sur les résultats obtenus au cours des diverses et déjà nombreuses expériences d'utilisation pratique de l'espéranto.

En 1921, la deuxième assemblée a constaté que ce problème éveillait un intérêt de plus en plus grand, mais n'a fait que proposer d'inscrire la question à l'ordre du jour de l'assemblée suivante et a demandé au Secrétariat un nouveau rapport détaillé.

Pour préparer ce rapport le Secréta-

riat Général envoya des questionnaires à tous les membres de la SDN ainsi qu'à toutes les organisations compétentes.

On missionna également le sous-secrétaire général Nitobe Inazo⁽¹⁾ pour participer au Congrès Universel d'espéranto de Prague en 1921. Il a été frappé de l'esprit élevé et du souffle d'enthousiasme humanitaire qui animaient l'assemblée. Il a constaté, dans son rapport, que le développement de la langue et son caractère vivant devaient beaucoup au puissant élan spirituel imprimé par Zamenhof au mouvement et à la littérature espérantistes.

De plus, la SDN hébergea une «Conférence internationale sur l'enseignement de l'espéranto dans les écoles». Ses travaux ont contribué à fournir au Secrétariat de la SDN une importante documentation pédagogique basée sur les nombreuses expériences réalisées dans un grand nombre d'états.

Pendant ce temps, le Secrétariat recevait aussi des propositions concurrentes: Les scandinaves proposaient l'adoption de l'anglais. D'autres proposaient de rescussiter le latin. On présentait aussi des nouveaux projets comme l'Occidental, le Parlamento, le Neo-Latina, ou des variantes de l'espéranto telles que l'Ido et l'Esperantide.

Le rapporteur reconnaît le rôle déterminant de l'anglais, du français et de l'espagnol (qui sont par ailleurs les trois langues de travail de la SDN) mais se refuse officiellement à en favoriser une.

L'espéranto a été recommandé, entre autres, par l'Association britannique des Sciences, la Chambre de Commerce de Paris^(voir annexe 2) et le Parlement de Finlande, ainsi que par le Congrès mondial des Associations internationales, réuni à Bruxelles en 1920. Les associations françaises et italiennes pour l'avancement des sciences se sont également prononcées pour l'espéranto.

L'ESPÉRANTO DANS L'ENSEIGNEMENT PUBLIC

Aujourd'hui l'Espéranto est enseigné dans certaines des écoles primaires

ou secondaires d'environ 320 villes de 17 pays et dans les cours du soir d'environ 1 200 villes de 39 pays des cinq continents, sur décision officielle prise par l'État ou par des autorités locales.

Beaucoup d'instituteurs se servent de la leçon d'espéranto pour faire aimer aux enfants la Société des Nations et son grand idéal de paix et de collaboration universelles.

On constate généralement qu'elle est huit ou dix fois plus facile qu'une autre langue étrangère et qu'on arrive à la parler parfaitement sans avoir besoin de s'expatrier.

Mais les différents responsables de l'enseignement insistent sur la nécessité d'un accord international pour garantir la stabilité d'une telle langue internationale artificielle.

ANNEXE 1

RÉSOLUTIONS ADOPTÉES PAR LA TROISIÈME ASSEMBLÉE LE 21 SEPTEMBRE 1922

Il a principalement été décidé: ... «Que les questions relatives à l'enseignement de l'Espéranto soient renvoyées devant la Commission de coopération intellectuelle⁽²⁾ pour que cette Commission fournisse son avis sur les différents aspects d'une langue internationale auxiliaire.»

ANNEXE 2

Rapport présenté, adopté et converti en délibération par la Chambre de Commerce de Paris dans sa séance du 9 février 1921. (Extrait): ... «Considérant que l'Espéranto paraît réunir les qualités désirables de clarté et de simplicité méthodique, tant au point de vue de la prononciation que de la grammaire, du vocabulaire et de la richesse d'expression; «La Chambre de Commerce de Paris: «1. Décide d'introduire l'enseignement facultatif de l'Espéranto dans ses écoles commerciales; «2. Émet le vœu que cet enseignement soit généralisé en France et à l'étranger, et que les Chambres de Commerce de tous les pays, soucieuses de faciliter les transactions com-



merciales, favorisent la propagation rapide de la langue auxiliaire internationale.»

ANNEXE 3

LETTRE CIRCULAIRE ET QUESTIONNAIRE ENVOYÉS AUX GOUVERNEMENTS DES ÉTATS MEMBRES DE LA SOCIÉTÉ (23 janvier 1922) Cette annexe reprend aussi in extenso la très intéressante «Réponse du Gouvernement britannique au questionnaire», extrêmement détaillée, dans laquelle on peut lire par exemple au sujet des résultats obtenus lors des nombreuses expériences pédagogiques: ... «Il n'est donc pas surprenant de constater que les enfants parlent l'Espéranto avec plus de soin qu'ils ne parlent leur propre langue,... pour la simple raison qu'ils parlent une langue qu'ils n'ont pas été habitués, pendant de longues années, à mal prononcer. Bien que l'étude de cette nouvelle façon de parler soit commencée un peu tard dans la vie, elle semble avoir quelque effet sur l'usage qu'ils font de leur propre langue.»

ANNEXE 4.

MÉMOIRE adressé à la Société des Nations par la Conférence internationale sur l'enseignement de l'Espéranto dans les écoles, réunie au Secrétariat de la Société des Nations du 18 au 20 avril 1922 (Extrait): ... «Loin de porter atteinte aux langues nationales, son étude aide au contraire les enfants à écrire et à parler plus correctement leur langue maternelle...Elle constitue une introduction à l'étude des autres langues,...chez des cerveaux ainsi habitués à manier une seconde langue.»

Notes

(1) Nitobe parlait espéranto. Il l'a toujours soutenu et l'a qualifié de «moteur d'une démocratie internationale»



Nitobe sur le billet de 5000 yens

(2) Le représentant de la France invoque la souveraineté des États en matière d'enseignement pour obtenir le renvoi de la question devant la Commission Internationale de coopération intellectuelle (ancêtre de l'UNESCO), sachant que celle-ci n'y était pas favorable.

Compilation et synthèse de JoLoKo

Le rapport est consultable dans son intégralité sur le site de SAT-Amikaro:
<http://www.esperanto-sat.info/article1862.html>

Campagne de pétition pour l'espéranto au Bac : on avance !

Après une – longue – période de discussion pour décider de réaliser cette campagne commune à Espéranto-France et SAT-Amikaro et en fixer les contours et le budget, le travail concret a enfin débuté.

Un week-end de travail a eu lieu à la mi-décembre. Lors de ces deux jours le budget a été repensé en fonction des contraintes financières fixées par les deux associations coorganisatrices, les lettres de sollicitation de Premiers signataires ont été rédigées et la base de l'argumentaire devant former le journal de la campagne a été adoptée.

Au même moment nous arrivait la réponse d'Albert Jacquard, généticien et essayiste, qui accepte de parrainer notre campagne. Il nous a écrit (à deux reprises) :

« Je reçois comme un honneur la proposition que me font les deux associations Espéranto-France et SAT-Amikaro de parrainer cette pétition en faveur de l'espéranto. Je souhaite que l'enseignement de l'espéranto soit officialisé par les autorités de nombreux pays. Un jour viendra où tout être humain saura utiliser l'espéranto comme un instrument de mise en commun. Développer l'usage de l'espéranto est un moyen de préserver l'avenir du français. »

Nous avons alors écrit à chaque député, chaque sénateur et chaque député européen, ainsi qu'aux maires de villes de plus de 100 000 habitants, pour leur proposer de signer publiquement la pétition et de figurer par conséquent dans la liste des premiers signataires. Plus de 1000 courriers.

A ce jour nous poursuivons cette recherche de premiers signataires en dehors du monde politique (artistes, linguistes, etc). Si vous avez des propositions de personnes à solliciter informez la rédaction de la Sago en mentionnant une adresse de contact (sans adresse il est difficile de contacter quelqu'un et les adresses ne sont pas toujours faciles à trouver).

